Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by Post as a newspaper.

# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

**Redakcio-Administracio :**
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

**Abono** (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj
**Anoncoj:** Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

**N-ro 74 (Seventh Year)** **Melburno** *(Melbourne)*, **Australio.** **10 augusto 1926**

## EVOLUTION OF AN IDEAL.

The present stage in the development of Esperanto is a transition period. During the past forty years the process of evolution has been rapid. From the day when Zamenhof gave to the world his masterpiece, to this year of grace, the countries of the world, east and west, have become permeated with the idea of a secondary language. Starting as an ideal, the language has become a practical necessity. It has passed the idealistic stage, from which it is now emerging as a practical utility. Commerce, science, politics and religion have ceased to regard the international language as a fad. All sections of human activity demand an easy, quick means of communication. Only one common lingual system exists—Esperanto. Its pioneers— all honour to them—have borne the burden for four decades; they have been actuated by the highest ideals, which can never be lost. Now must be considered the attitude of official Esperanto towards the utilitarian demands of the people of all nations. Whether to advocate Esperanto solely from an idealistic point of view, or to concentrate on efforts which tend towards its adoption for practical purposes as well. Hitherto the peace ideal has been pressed—and rightly so—nevertheless, perhaps in stressing this idea, the practical application has suffered. Esperantists all long for the universal adoption of Esperanto, they wish to see the language used by all people of all countries. To attain this we must be able to show to business men, governments, scientists, the press, the churches and others that it is to their interest to use Esperanto. Almost the first question asked by any merchant, when the subject is broached, is "how will it benefit me?" By that he means shall I make any money by it? While that aspect may be deplored by many, yet it must be faced if Esperanto is to become a world secondary language. This is the transition period in the history of Esperanto.

## 2KY WIRELESS LESSONS.

The series was inaugurated on Tuesday, 4th August, when Mr. F. T. Simon devoted the whole of the available time to an introductory exposition of the reasons why Australians should interest themselves in Esperanto and why it is most fitted as the international language. Brief reference was also made of the wonderfully successful 18th Universal Congress then taking place in Edinburgh, Scotland.

At all future broadcasting the first five minutes will be taken up by lecturettes on some prominent feature in the Esperanto movement to enable the listening-in public to gauge the wide range and illimitable uses of Esperanto, and then pass over to a self-contained lesson in the language for the remainder of the period.

## LA SEP MALLABORULOJ.

—

Longe antaŭ ol la urbo Bremen estis konstruata, sin trovis en tiu loko nur brasikaj terpecoj kaj kampoj. Sed la kampoj donis nur mezan profiton ĉar granda parto estis sablo kaj la malaltaĵoj estis ĉiam minacataj de rivera superverŝigo. Eĉ post kiam la rivero reiris ĝis siaj ĝustaj bordoj akvo restis sur la malaltaĵoj ĝis malfrua somero, kaj venenaj vaporoj elkovitaj per la varmeco de l' sunradioj portis peston en aeron. Pro tio la ĉirkaŭaĵo estis malmulte homhavanta, kaj nur la plej malriĉaj urbanoj posedante tie terpecon kaj trovinte aliloke lupagon tro alta loĝadis apud tiu marĉo.

Antaŭ tre multe da jaroj troviĝis tie viro, kiun pro la grandeco de lia bieno oni opiniis riĉa, sed kiu, malgraŭ tiu famo, estis la plej malriĉa el ciuj siaj najboroj. Ĉar liaj brasikterpecoj estis la plej senfruktaj kaj sablaj kaj lia herbeja estis, en la daŭro de l' tuta jaro, marĉa, li povis fidi nur al malgranda rikolto da fojno. Tial li ne havis bovinon, sed kontentigis sin je kaprino, kvankam tiu ĉi lasta ne sufiĉis por lia bezono. Li ne povis dungi laboristojn, tamen malgraŭ tio ke lia mastrataro estis grandnombra, ĉar li havis sep filojn, ĉiu pli granda kaj forta ol la alia Ili vagadis ĉiun tuttagon, rigardis la akvon, sentis venton kaj veteron, kaj kiam ili atingis la hejmon meztage, havis malsaton kiel tiu de lupoj, ĉar nenio en la mondo kaŭzas pli bonan apetiton al ĉeesto apud kuranta akvo en freŝaero. Tie ili sidis ĉirkaŭ la granda kverktablo, la sep fortegulo, kaj estis ĝojige rimarki, kiel ili amis al subtegmento por ripozi dum unu mallonga horo, kusiĝis laŭlinie por dormado, kaj ronkadis tiel forte, ke la muroj ĝemis. Kiam ili sin sentis refortigitaj, ili streĉe rektigis sin kaj foriris denove laŭ la bordoj de l' rivero por vidi, kiamaniere fisistoj kaptas fiŝojn kaj kiel la ŝipoj velveturas supren-malsupren. Tuj post sunsubiro, ili hejmeniris por enlitiĝo, sed unue ili glutegis grandegan noktomanĝon. Tiam, kusiĝinte, ili dormis samkiel arboj, plene kaj nevekeble ĝis la suno staris alte sur la ĉielo alvokante la areton al matenmanĝo.

Tiamaniere ili pasigis la tempon de jaro al jaro, unu tagon kiel la alian en daŭra senokupateco. Tial la tuta najbararo nomis ilin "La Sep Mallaboruloj." Ili sciis tion tre bone, sed la babilado de l' tuta mondo ja ne ĝenis ilin. Ili havis bonan konsciencon, kaj kiam ili atingis hejmon la tablo estis ĉiam pretigita. Babilado de ĵaluzaj homoj estas facile forgesita.

Estas vere, ke la patro keikfoje ilin rememorigis, ke li maljuniĝas, kaj ke li fidas al ili helpi lin. Sed tio estis ridinda pro tio, ke li havis tiel malmulte fari. ke li sidis tutan tagon sur benko antaŭ la domo. aŭ parolis pri vetero kun preterpasantaj najbaroj. Li ankaŭ rigardis dum longa tempo, kun falditaj brakoj, sian marĉon, farante al si komparojn, kaj pensante kiom pli prosperaj estis Johano, Petro, Aleksandro ktp. ĉar tiuj havis sekajn kampojn kaj sanigan fojnon. Poste li ĝemis profunde, kaj turnis sin por endomeniro, lasante ĉion kiel antaŭe.

La patrino melkis la kaprinon, kuiris napojn kaj brasikojn, provizis brulaĵon kaj akvon, kaj estis, mallonge dirite, la unusola kiu atentis la mastrumadon.

Tia vivado daŭris longatempe, sed fine la fratoj komencis senti enuecon, estante senokupaj. Ili rimarkis, ke iliaj samaĝuloj per laboro ĉe aliaj personoj akiris monon kaj prosperis. Je tio la plej maljuna diris al siaj fratoj, —Vi scias, ke ĉar mi estas la unuenaskito, la patra bieno apartenos al mi, sed mi jam cedis mian rajton al la plej juna. Mi dungiĝos kun nekonatoj, kaj espereble post mallonga tempo estos perlaborinta sufiĉe por aĉeti bienon por mi mem. La parolo plaĉis al ĉiu. Ili ĉiuj decidis fari tion saman, kaj lasi la patran domon. Eĉ la plej juna ne volis resti hejme. Ŝajnis al ili, ke estas grandaĵo iĝi laboristoj gajnantaj monon. Do, irante de domo al domo, ili proponadis sin kiel laboristojn, gigantaj viroj havantaj larĝajn ŝultrojn kaj fortajn tendenojn kaj muskolaron. Sed ili ne trafis la celon, ĉar kien ajn ili iris, ĉie la homoj ekridaĉis, dirante unu al alia, —Rigardu la mallaborulojn. Jen ili serĉas laboron. La patra bieno jam ne ilin nutras, pro tio ili volas esti nutrataj ĉe ni. Sed ili ne ŝatas laboron, kaj ĉi tie ni nur bezonas laboremulojn. Foriru, vi sep nenionfaristoj— Do, ili pluiris de domo al domo, unue al la najbaroj en la antaŭurbo, poste en la urbo mem, supren ĉi-straton malsupren alian straton, sed troviĝis neniu, kiu volis dungi ilin. Eĉ tiuj, kiuj ne konis ilin de antaŭa tempo ne

ilin atentis, ĉar ilia malbonfamo jam kurege antaŭeniris.

Tial ili revenis hejmen lacaj, ĉagrenitaj kaj malsataj. La patrino alportis la noktomanĝon, sed por la unua fojo en siaj vivoj ili ne ĝin ĝuis Ankaŭ ili ne tuj sin kuŝigis laŭkutime, sed plivolis sidadi senparole sur la benko pendkape, kun la brakoj krucigitaj sur brusto, kaj la kruroj etenditaj ĝis mezo de l' ĉambro.

La patro kompatis la sortostaton de la knaboj, kiuj deziregis progresi en la mondo, kaj montri siajn fortojn kaj lertecon, sed al kiuj oni ne donas bonokazon. Li penis konsoli ilin, volante doni al ili sufiĉan laboron per la propono, ke estante li turmentos sin per nenio kaj transdonos al ili tutan zorgon de l' bienestablo.

La filoj diris nenion, sed ĉiuj rigardis la maljunan, atendante kion li diros. Tiu sin turnis al la patro, ne plu povante sin reteni, kaj diris. — Eĉ se vi donus al ni okupon, ni ne povus forigi la malbonfamon de ni ĝisnun meritita, kaj ni tial kredas, ke ni ja povos fari plibone kiel dungitoj. La nemultajn pizojn kaj fabojn vi povos planti sola, kaj vi povos facile rikolti la fojnon de l' marĉo senĝene. Maljunulo, kiel vi, povas facile administri la tutan mastraĵon, sed ni, ni deziras labori, kaj el ĉi tie elpeliĝante, ni iros morgaŭ en la vastan mondon—. Estis neutile, ke la patro penis emigi ilin forlasi tiun projekton; ke la patrino plorpepis kvazaŭ ŝi plorigus al ŝi la okulojn. Tuj kiam la suno aperis, ili adiaŭis kaj foriris al la leviĝanta suno, neatendante la kompatindajn gepatrojn, kiuj staris plende ĉe l' pordo, streĉe rigardante ilin. Kiam ili jam ne povis vidi la filojn, la paro reeniris la domon, por krie demandi reciproke, kial la knaboj ilin forlasis. La solo konsolado estis, ke malsato eble repelos hejmen la idojn. Tial ili serĉadis okule avide la lokon en kiun ili malaperis, sed kvankam ili ĉiutage okulserĉis, ili ne vidis nek aŭdis ion pri ili.

El la Germana lingvo. (Daŭrigota)

---

## ĈE LA POLICEJO.

Vi plendas, ke oni frapadis vian kapon per kaserolo, kaj neniun postsignon de la batoj oni vidas sur via kapo!

La plendanto: Ho! Jes, s-ro Policano. Sed se vi vidus la kaserolon.

## LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata samideano,

Per tiu ĉi letro mi penos interesigi vin pri la nova Federala Ĉefurbo, Canberra. Laŭ raporto de la Federala Ĉefurba Komisiono la konstruado de la nova Parlamentejo ĉe Canberra estos baldaŭ finita, kaj laŭ promeso de la ĉefministro, la parlamento okupos la novan sidlokon en la fruaj monatoj de 1927

La konstruado de la urbo mem bone progresas; jam kelkcentoj da domoj estas konstruitaj, kaj baldaŭ estos finkonstruitaj la domoj kie loĝos la Generalgubernatoro kaj la Ĉefministro. Oni nun konstruas kelkajn vojojn al proksimaj urboj, sur kiuj oni plantas arbojn.

—Australio instruas la mondon en la arto de urbkonstruado, tiel diris kavaliro H. Lund la bone konata filantropo, kiu antaŭ nelonge alvenis en Melbourne dum mondvojaĝo. Li restis kelkajn tagojn ĉe Canberra, kiu laŭ lia opinio estas tre pitoreska loko.

—Mi opinias, ke la urbo estas projektata lerte kaj laŭsperte, kaj fine estos unu el la rimarkindaj ĉefurboj de la mondo—, li diris. —La tenado sub la kontrolo de la komisiono de la tuta urbtero, kaj la fakto ke la parceloj neniam estos vendataj, kaj sekve ke neniu povos malbeligi la urbon, kiel oni jam faris en Vaŝingtono, estas bonega ideo. Commonwealth-avenue en Vaŝingtono ne harmonias kun la originala ideo, ĉar la konstruplano estas diversigita, kaj troviĝas tre altaj konstruaĵoj apud malaltaj. Ĉe Canberra la tuta konstruado estas kontrolata de la komisiono, kiu ne permesos al kiu ajn konstrui, malbelegaĵojn kiajn oni povas vidi ĉe Vaŝingtono. Alia afero kiu faris impreson al mi—, li diris; —estas ke oni intencas konstrui rondan ĉefurbon kun la parlamentejo en la mezo. Tiu estis la ideo pri Vaŝingtono, sed la konstruprogreso sin direktis okcidenten, kaj nun Vaŝingtono estas nur duone ronda. Eventuale Canberra havos grandan loĝantaron en la industria areo, kaj jam estas difinita de la komisiono tiu areo, kaj ili malpermesos industriajn konstruaĵojn en aliaj partoj de la urbo. La universitata aero certe allogos multajn gepatrojn, kaj tiu ĉi areo estos plene loĝata. La militlernejo ankaŭ allogos ĉirkaŭ si la geparencojn kaj amikojn de la lernantoj, tiel ke la urbo ne kreskados en nur unu direkto, sed ciam konservos la rondecon. La in-

tencoj de la komisiono ĉiam efektiviĝos tial ke oni neniam vendos la parcelojn, kaj ili havas la povon ordoni la laŭplane arkitekturan stilon. La sola loko kie mi vidis tiun ĉi ideon efektivigita estas ĉe Nuremburg, Germanujo, kie la urbestaro havigis la povon malpermesi la konstruon de konstruaĵoj, kiu ne harmonias kun la mezepoka arkitekturo de tiu urbo. Delhi estas la konstruo de nova urbo proksime al malnova. Oni povas gratuli Australion, ke ĝi donis al la komisiono tiajn povojn. Nenie en la mondo oni trovas ion similan, kaj post periodo de 25 jaroj, mi opinias, ke la popolo estos fiera pri sia decido kaj pri la ĉefurbo.

Antaŭ kelkajn tagojn oni aŭkcie vendis parcelojn al tiu, kiu volis doni la plej grandan sumon. La luanto devos pagi po 5 procento de la sumo proponita dum 20 jaroj, ĉar la luprezo de la parceloj estas 5 procento de la nuna tervaluto, kaj post ĉiu 20 jaroj la komisiono havas la rajton plialtigi la luprezon, se ili opinias, ke tiam la parcelo fariĝis plivalora.

La unua aŭkcia vendado al luantoj okazis dum decembro 1924. Post tiu dato multaj homoj private kontraktis por lui la parcelojn. La lasta aŭkcia vendado tamen alteris multe pli da intereso kaj oni proponis sepmilfuntojn sterlingaj por sidloko de kinematografejo; por alia parcelo ĉe angulo de du stratoj longe kaj larĝe je 53 futojn la luprezo estis po 5 procento de 2400 funtoj sterlingaj po jare.

La Canberra distrikto estis aĉetita de la registaro po nur kelkaj ŝilingoj por akreo, kaj nun kaj por ĉiam la registaro ricevos 5 procento de la valuto de la parceloj, kiuj eĉ nun valoras po multaj funtoj sterlingaj por futo en la ĉefstratoj. La projekto estas sukcesa, kaj por ĉiam la registaro ricevos grandegan renton de la nova ĉefurbo Canberra.

Kie nun staras Canberra antaŭ nur kelke da jaroj estis bieno ĉirkaŭita de praarbaro.

Via fidele, P.H.

---

## STRATO ZAMENHOF.

—

La urbestraro de Dresdeno decidis doni la nomon de D-ro Zamenhof aŭtoro de Esperanto, al strato en antaŭurbo Leuben. En la sekvantaj lokoj jam ekzistis strato Zamenhof: Sotteville-lez-Rouen (Francujo), Terassa, kaj Sabadell (Hispanujo), Bialystok (Polujo) kaj Kaunas (Litovujo).

## KRONIKO.

—

HOBART, Tasmanujo. — La jara kunveno de la Hobarta Esperanta Grupo okazis je la 7 julio. La oficistoj de la pasinta jaro estis reelektitaj, kiel jene:—Prezidantino, C. M. Hannaford; Secretariino, A. Beckett; Kasisto, K. Simmons.

AUCKLAND, Nov-Zelando:—Nova kaj bonvena signo de progreso troviĝas nune en tiu ĉi urbo: du semajnaj gazetoj publikigas regulajn lecionojn. Ĉis nune ses lecionoj aperis, ĉi tiuj gazetoj ankaŭ enhavas novaĵojn pri Esperanto. La Remuera Klubo aranĝis Esperantan Balon, kio okazis dum 4 aŭgusto.

DUNEDIN, Nov-Zelando:—Ĉar la Ministro de Eduko konsideras fruan ŝanĝon pri la lernoplano de Nov-Zelandaj duagradaj lernejoj necese, la klubo sendis peton al la Ministro petante la enkondukon de Esperanto kiel anstataŭaĵo por la franca kaj germana lingvoj.

MANGARAO-HYDRO, Nov-Zelando:—La nove starigita klaso funkcias bone. Ĉiuj el la anoj faras laŭdindan progreson sub la gvidado de la fratoj McGuigan. Ŝajnis ke la entusiasmo de la gvidantoj estas enirinta la klubanoj.

MASTERTON, Nov-Zelando: — Stariĝis dum pasinta monato nova klaseto, kiu estas la tria Nov-Zelanda klaso starigita dum la kuranta jaro. Instruisto, sinjoro Dewar, Secretariino, sinjorino L. Payne.

WELLINGTON, Nov-Zelando: — Dum la vespero de la unua de julio, s-ro W. H. King brodkastis sian duan paroladon titolitan, "La Historio kaj Disvastiĝo de la Internacia Lingvo, Esperanto." La parolado daŭris dudek minutojn, kaj estis raportita en la tagĵurnaloj ĉe Wellington, Auckland kaj Whangarei. S-ro King brodkastos pluajn paroladojn en la intereso de nia kara lingvo. Vizitantoj al Wellington dum la kuranta monato estis s-ro A. Williamson, Vic-deligito de U.E.A. el Feilding. Gesinjoroj King, el Gisborne, ankaŭ vizitis la ĉefurbon.

MELBURNO, V. — La eroj en la Melburna Esperanto Societo programo dum la lastaj semajnoj, estis interesaj por la anoj kiuj partoprenis, speciale instruigaj estis la novaj gramafondiskoj, per kiuj la anoj povas aŭdi la korektan elparoladon de la lingvo laŭ la fama kaj elokventa parolanto, s-ro E. Privat. Interesa

parolado, "La Lando de la Poeto Burns" de s-ro Scurrie, donis plezuron al la aŭskultantoj, precipe al tiuj kiuj konas la lokojn kaj ilin vizitis. —

Laŭ sciiĝoj ricevitaj de la jenaj gesamideanoj, ili gajnis kun honoro, la Unuagradan Ekzamenon, — Finoj. K. Lane, F. Mulhall, kaj s-roj J. Frawley, J. Robert, J. Byatt. — Gratulojn al ĉiuj!

---

## PROPOSAL FOR THE USE OF ESPERANTO IN SCIENCE.

—

200 students of the University of Rio de Janeiro have addressed a petition to the German Ambassador in Brazil proposing that certain standard works in German medicine should be translated into Esperanto for the use of foreigners. The scientific teaching of the great German masters, says the petition, is interpreted to us through a few translations in French, Italian and Spanish, and we are accordingly obliged to learn those languages. In view of the great difficulties in the study of German, the majority of the most important works remain unknown to us. The only possibility of facilitating for us a knowledge of the great scientific labours of German scholars lies in the translation of the principal works into Esperanto. Twenty lessons suffice to enable the learner to read and understand anything that is written in this wonderful and sim-

## ESPERANTO AND SCIENCE.

—

The society for the study and dissemination of agricultural zoology (Institut zoologique, Bordeaux) at its general meeting on 21st February, 1926, expressed the following desire:

In view of the great variety of languages in which scientific works and reviews are published and of the great advantage which would arise from summaries in a common auxiliary language.

And of the fact that such a language exists in Esperanto, which besides being extremely easy in itself is suitable for the translation of scientific texts, and that the value of this language, which has been proved by long experience, was demonstrated afresh at the International Conference in Paris in 1925;

This meeting expresses the desire, that all scientific treaties and articles should be accompanied by summaries in the auxiliary language Esperanto.

The Universal Esperantist Medical Association (Teka) founded in 1908 by Prof. Dor of the University of Berne and comprising members in 40 countries, publishes a medical review under the name of "Internacia Medicina Revuo" printed entirely in Esperanto.

This review has, since January 1926, been published in Lille under the direction of Dr. Vanverts, Professor in the Faculty of Medicine of Lille and Corresponding Member of the French Academy of Medicine.

—I.E.S.

---


# SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS

—

## HOBART — EASTER, 1927.

—

Venu al Tasmanio, la Ĝardena Ŝtato, por via libertempo.
Belegaj vidaĵoj! Reviviganta klimato!
Esperantistoj speciale bonvenotaj.

---

## HAROLD PUDNEY Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

## RECENZOJ.

—

BENJAMENO F. SMITH, Historieto pri Elfarado; de Everett W. Lord, Boston, U.S.A.

Tiu estas lukse presita, kartonita libreto, kaj ĝi mallonge skizas la travivaĵojn de naŭdekjara riĉulo. La grava punkto rilate la libreton estas, ke la aŭtoro estas Dekano de la Kolegio de Komerca Administrado de la Bostona Universitato, Usono. Gratulinda afero ankaŭ estas, ke Dekano tiel bone scias Esperanton ke li per tiu lingvo povis verki la libreton, kaj plie, ke li elektis Esperanton kiel la ple taŭgan rimedon por atingi vastan rondon. La aŭtoro diras, "Ĉi tiu libreto estis donacata al la lernantoj en la Kolegio de Komerca Administrado de Bostona Universitato pro la sindonemo de s-ro Smith . . . . . . Estis la espero de s-ro Smith, ke la studentoj kiuj legas la rakonton povu ricevi el ĝi inspiron, kiu ilin instigos serĉi fundamentojn valorajn; ke ĝi ilin helpu konstati la gravan fakton, ke sukceso ekonomia dependas de la intimaj virtoj: ŝparemo, kuraĝo, kaj laboremo.

Tiom bonvenis la libreton la studentoj kaj ceteraj, ke oni opiniis ke estas dezirinde ĝin eldoni Esperante, kaj pro la malavareco de s-ro Smith ĉi tiu iĝis farebla." La libro ne estas aĉetebla sed oni disdonis ĝin kun la peto, ke ricevinto returne sendos al s-ro Lord mallongan priskribon, kaj en sia propra lingvo kaj en Esperanto, pri sia urbo, komerca aŭ profesia vivo. (C.W.B.)

LA PANNE. Gvidlibreto eldonita okaze de la Kongreso de la Belga Ligo Esperantista, La Panne. Majo, 1926.

La lokaj turismaj organizaĵoj konvinkitaj ke la helpa lingvo, Esperanto, povas multe faciligi la internaciajn rilatojn decidis eldoni tiun gvidlibreton por sin diskonigi al la eblaj vizitantoj.

## ESPERANTO.

—

Esperanto, the universal language," has made remarkable progress in Adelaide during the past 12 months. A society for its propagation was formed in 1910, but the war seriously interfered with its activities, and the endeavours of only three or four enthusiasts kept it alive. Efforts were made to revive it at the close of the war, and gradual progress was made until the beginning of 1925.

When the classes were re-opened at the Theosophical Society's Hall last year, the attendance increased to 30 members. Since then the movement has continued to grow rapidly. Small study circles have been formed in the suburbs. There are 60 students of Esperanto in the All Nations' Chums movement.

In Adelaide the movement has been fostered since its inception in South Australia by Mr. W. L. Waterman, President, and Mrs. A. W. Porter, Secretary and Treasurer, both of whom take charge of the weekly classes held at the Theosophical Society's rooms.

—Daylight.

## JURNALOJ RICEVITAJ.

—

Amikeco, 6; Arbeider-Esperantisten, 4-5; British Esperantist, 254, 255; Brazila Esperantisto, 1-4; Belga Esperantisto, 5; Bulteno Antverpena, 5, 6; Die Einheilsfront, 18 ĝis 21; Esperanto (Romana), 310; Esperanto-Uutiset, 1, 2,-3; Heroldo de Esperanto, 32 ĝis 36; Holanda Esperantisto, 1, 2, 3; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, 135; Internacia Medicina Revuo, 3; Jarlibro de la Lingva komitato, 1926; La Espero, 5; La Unuigita Tuthomaro, majo, junio; La Suno Hispana, 108; Le Danube, 7-8; Litova Stelo, 5-6; La Ora Epoko, 15; Oomoto, 15, 17; Pola Esperantisto, 5; Portugal-Esperanto, 4; Revista del Ateneo, 22; Esperanto, 309, 310.

**ĈIU KATOLIKO** **ĈIU KATOLIKO**

**ĈIU INTERESATO PRI KATOLIKISMO**

**nepre abonu la monatan revuon ilustritan**

**ESPERO KATOLIKA**

16-paĝa — 27 x 18,5.

**Jara abonprezo: 4 ŝilingoj.**

**55 RUE DE VAUGIRARD, PARIS (VI).**

To the Editor, "La Suda Kruco."

Dear Sir,—On the 12th June, I broadcast from the local radio station my first talk on the subject of "The Radio Language, Esperanto"; and I have now prepared notes for a second broadcast. In the preparation of both sets of notes, I have received valuable assistance from news published in the columns of the Suda Kruco; and I am unable to let the occasion pass without informing you of the fact.

During the past sixteen months I have filed each copy of the Suda Kruco. I am indeed thankful that I carried out this practice, for there is now in my possession an extremely convenient and useful source of information to which I can refer for details relative to the language in its various branches.

The Suda Kruco was severely criticised at the Assembly of the 5th Australian Congress on account of alleged over-excerpting of news from other journals; and since the conclusion of the Congress the question of whether or not the policy of including a certain amount of reprints in the gazette is a good one, has been very much in my mind; but in view of my recent experiences, I am of the opinion that the republishing of important facts connected with the movement adds to the usefulness of the Suda Kruco, particularly to those who are engaged in active propaganda work. Provided that the same sound judgment is exercised in the matter of selecting suitable excerpts, I consider that the policy is a splendid one, and should be persued.

For some years I have been a constant subscriber to "Esperanto" and "The British Esperantist"—now "International Language"—and without any desire of flattering you, or of under estimating the worth of those splendid journals, I have no hesitation in writing that to Australians and New Zealanders, for utility, the Suda Kruco equals them and has claims for support just as strong as those of the journals which I have mentioned.

With all good wishes for the expansion and progress of gazette.—I am, yours, etc.,

WM. H. KING.

Wellington, N.Z.,
30th June, 1926.

## TELEGRAPHING ESPERANTO IN AUSTRALIA.

With a view of ascertaining the Australian Postal Administration's attitude with regard to telegraphing Esperanto, the Sydney Esperanto Society recently despatched a letter to the Postmaster General's Department and received the following reply:—

"Referring to your communication of the 9th July, concerning the use of Esperanto within and beyond the Commonwealth in terms of the 'International Telegraphic Regulations' as amended at the conference in Paris late last year, I have to inform you that the question is under consideration by the Central Administration of this Department, and when a decision is arrived at you will be further advised.—Yours faithfully,

(Sgd.) J. W. KITTO,
Deputy Director, Posts & Telegraphs.

## ALVOKO TASMANIA.

Tasmanio korformata, kun beleco korŝatata
Estu fortaloga land' al vi.
Nia volo vin allogi, kaj la lingvon do apogi.
Venu grandamase petas ni.

Bela estas nia lando de la mezo al la rando.
Venu, vidu ĝui ĝin kun ni.
Kara Esperantistaro venu trans la blua maro,
Paroladon esperantan ĝuos vi.

Kaj ni kantos, kaj parolos, ĝis vi ĉiuj kore volos,
Resti ĉiam kune tie ĉi
Sed vi devos hejmen iri, kaj vi tiam povos diri,
Ke memorajn dolĉajn tenas vin.

—K.S.

## HERE AND THERE.

**Esperanto and Literature.** Revuo Orienta (Tokio, Aprilo) states that the Japanese romance "Deklaracio" has been translated from the Esperanto version into Hungarian. The Polish work "Marta" is being translated from the Esperanto version into Japanese.

Ni povas al niaj legantoj sciigi ĝojan novaĵon: en Julio aperos la plena traduko de la Malnova testamento, super kiu oni de jaroj laboris. Tio estos por nia lingvo nova triumfo.

## "ON THE ROCKS."

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

The Association has found it necessary to circularise its delegates, urging them to do all that is possible to collect outstanding subscriptions and enrol new members. It was hoped that the association would at this time consist of 10,000 members, but owing to new members only numbering 1400 and 3750 old ones not renewing their subscriptions the membership has fallen to 8000. The year 1925 ended with a deficit of 3700 francs, but this year the deficiency will be 12,000 francs. As a result of what the official communication designates this "fiasco," it is indicated that the size of the Yearbook as well as of "Esperanto" will have to be reduced and the activities of the office curtailed. Is there a "slump" in the Esperanto movement? Will the many Victorian members who are in arrear renew their subscriptions at once, and will those members in other States who have allowed their subscriptions to fall in arrear make their payments with promptitude? Payments may be made to the nearest Delegate or to Mr. C. W. Ballard, chief delegate, at the address given in the yearbook.

## PROPAGANDA.

An interesting lecture on Esperanto was given by Miss Alleyne Sinnotte, at the Methodist Young Peoples' Society, on the 14th of July; there was a good attendance. As a result of the lecture a group will be formed under the guidance of Miss B. R. Blyth.

Miss Sinnotte has been asked to repeat the lecture at Mitcham.

## LINGVA KOMITATO.

### Elektoj.

31 majo 1926.

Anoj: 111.
Reelektita: S-ro Stroele.
Elektitaj: S-roj Bennemann, Ĉernohvostov, Dohler; s-ino Dresen; s-roj Ellsersiek, Grau-Casas (Jaume), Grenkamp-Kornfeld, Grot, Karolczyk (Eska), Kostecki, Kreuz, La Colla, Pillath (Zanoni), Rossello-Ordines, Scott kaj Waringhien.

La Prezidanto
de la Akademio kaj de la Lingva Komitato: Th. Cart.

---

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je ia oka horo.

**Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaudon de 7.45—10 ptm. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo.** Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

**Hobarta Esperanta Grupo.** Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str:, ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A Beckett, 177 Davey-str:, Hobart.

**Persista Grupo,** Melburno. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

*Cole's Book Arcade, Melbourne.*

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

**"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.**

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.